

No. IV.

aparteno de
Heruaj kumbateloj

La plej bonaj spritaĵoj.



2652082

La plej bonaj spritaĵoj

el

„Munĥenaj flugantaj folioj“

(Münchner Fliegende Blätter)

:: Volumo 1—70. ::

Kolektitaj de

H. Jost



Prezo 60 Sd.

Eldonejo Walther Fiedler
:: Leipzig. ::

Antaŭparolo.

La jena kolekto de spritaĵoj kaj humoraĵoj prezentas al la gajema leganto elekton plej zorge faritan el la unuaj 70 jarkolektoj de la konata humora gazeto „Münchner Fliegende Blätter“ kaj tradukitan en la internacian lingvon „Esperanto“.

La germana originalo de ĉi-tiu traduko trovis grandegan disvastigon kaj mi esperas, ke la Esperanta traduko trovos egalan aprobon de la legantoj. Ĝi estas farita de estraranoj de Kenigsberga grupo Esperantista, nome F-ino Vally Cuno, s-ro G. Schattat kaj s-ro Paŭlo Preskaŭ.

Bona kaj sana humoro estas la plej efika gajigilo kaj devas foresti nenian societan kunvenon. Grupestroj kaj kursestroj uzu la libron, ĉar ĝi estas fonto de gajeco kaj sukcesa amuzigo. Ĉiuj senĝene uzu la enhavitajn humoraĵojn, ĉar ili estas sen ia aŭtora rajto.

La eldonisto.



1376143

Tabelo de preseraroj.

Pro la iom urĝa presigo kaj ne sufiĉa, zorga revizio de la korektaĵoj per la presisto aŭ rompiĝo de supersignoj dum presado, bedaŭre enŝoviĝis kelkaj preseraroj, ĉefe literŝanĝigoj, kiujn oni bonvole korektu laŭ ĉi-suba tabelo (P = paĝo, L = linio):

P 7 L 5	legu: „mortpafita de mi“
P 12 L 10	„Neces <u>a</u> anstataŭ „neces <u>a</u> “
P 16 L 7	„kiel skribist <u>o</u> “
P 17 L 3	„resaniĝ <u>i</u> s“
P 21 L 2	„depos <u>t</u> “ anstataŭ „depos“
P 21 L 6	„lian“ anstataŭ „sian“
P 23 L 17	„Ĉ <u>u</u> “ anstataŭ „Cu“
P 25 L 2	„sinjorino komer <u>ca</u> “
P 25 L 14	„neces <u>a</u> “
P 29 L 12	„jam“ anstataŭ „iam“
P 30 L 9	„kiom“ anstataŭ „kion“
P 31 L 5	„aliaj ambaŭ“ anstataŭ „dua aliaj“
P 35 L 6	„kiom“ anstataŭ „kion“
P 39 L 8	„malpermesit <u>a</u> “
P 39 L 12	„regimentoj <u>o</u> “
P 40 L 4	„deziras“
P 40 L 5	„kial li povas“
P 40 L 7	„tuta vero“
P 40 L 11	„Diru! Kien“ anstataŭ „Aŭdu! Kie“
P 41 L 1	„egala“
P 46 L 1	„varmiĝ <u>i</u> s“
P 48 L 18	„iom <u>a</u> “ anstataŭ „iom“
P 50 L 3	„edzo“ anstataŭ „edzino“
P 53 L 4	„Patra“
P 55 L 15	„vi vin senigis de ĝi“
P 55 L 17	„mi povas“ anstataŭ „mi ne povas“
P 56 L 6	„vekiĝ <u>i</u> s“
P 57 L 7	„Ĉefa afero“ anstataŭ „Sugestia“
P 58 L 9	„al“ Berlino“
P 58 L 16	„numero 7 $\frac{1}{2}$ “
P 58 L 16	„numero n 8“
P 58 L 17	„egala“
P 59 L 8	„unu enaskit <u>o</u> “
P 60 L 11	„Unu <u>a</u> “
P 62 L 15	„sur“ anstataŭ „super“



Malagrabra trankviligo.

A.: „Mi diras al vi nur jenon: kiam mi sumigas, kiom kostas mia ĉaskarto, kiom mi konsumas, kiom mi plielspezas por vestoj kaj botoj kaj kiom ajn profitokazojn mi preterlasas, tiam ĉiu leporo mortpafinta per mi, kostas al mi almenaŭ 10 spesmilojn“.

B.: „Nu, en tia okazo danku Dion, ke vi trafas nur malmultajn!“


* *
*

Rezervita kritiko.

Nu, sinjoro profesoro, kiel plaĉas al vi la sinjorinoj en la komedio de mia bofilo?“

„Treege, bonege! Tiuj friponinoj estas trafe karakterizitaj; — eĉ ĉio, kion ili parolas, estas ŝtelita!“

* *
*



Tro peza.

Poŝtovicisto: „La letero estas tro peza, — vi devas surglui ankoraŭ unu poŝtmarkon.“

Vilaĝanino: „Sed tiam ĝi ja fariĝos ankoraŭ pli peza!“

* *
*

Senkora sincereco.

Edzo: „Bedaŭrinde ankaŭ mi suferas pro la bankroto, mi perdis multon, multegon! Ni nun devas malaltigi niajn elspezojn; sed mi promesas al vi, Emilino, ke mi laboros tage kaj nokte, por reakiri nian antaŭan riĉecon kaj eble ankoraŭ pli multe, — eĉ se mi ruinigos mian sanon. Mi deklaras al vi: post dek jaroj vi estos aŭ milionulino aŭ — vidvino!“

Edzino: „Ĉu mi ne povas esti samtempe unu kaj alia?“


* *
*

Superflue.

Policisto: „Ĉu vi ne scias, ke vespere devas troviĝi lumanta lanterno sur la veturilo?“

Vilaĝano: „Nenion helpus — mia ĉevalo ja estas blinda!“

* *
*



La sovaĝuloj.

Misiisto estas invitita al familia tagmanĝo. La filino venas en iom dekoltita vestaĵo, tial la famiestro volas peti indulgon de la misiisto, parolante pri la nuna modo. „Ho, ne zorgu“, diris ĉi-tiu, „tio tute ne ĝenas min, mi ja vivis dum dek jaroj inter sovaĝuloj.“

* *
*

Multekosta pasio.

Edzo: „Sed edzino, diru do al mi, kial vi virinoj tiel multe ornamas vin kaj ĉiam deziras havi novajn vestojn? Ĉu vi kredas, ke tia lukso plaĉas al la viroj?“

Edzino: „Ho, ni tute ne volas plaĉi al la viroj, ni nur deziras enviigi aliajn virinojn!“


* *
*

El la instruado de konfirmotoj.

Pastro: „Nu, Klanjo, kiel vi plej bone pruvos al viaj gepatroj vian dankemon en praktika vivo?“

Klanjo (post ioma hezito): „Per tio, ke mi baldaŭ havigos al mi fianĉon!“

* *
*



Malfeliĉo.

Kuracisto (al sia edzino): „Rilate al la komerca konsilanto mi havas grandegan malfeliĉon. Antaŭ nelonge mi faris al li kuracistan viziton — li estis foririnta, hodiaŭ ceremonian viziton — kaj li estis hejme!“

* *
*

Granda peno.

A.: „Ĉu vi kredas, ke hodiaŭ matene mi havis penon, por decidigi mian botiston, akcepti de mi 5 spesilojn?“

B.: „Tio ne okazis ĝis nun! Kial do?“

A.: „Jes, li nepre postulis dek.“

* *
*

Certe helpanta rimedo.

„Kial do vi trumpetis tiel freneze?“


„Nu, sciu: mia domposedanto ne volas permesi, ke mi forlasu la loĝejon antaŭ la kontrakta limtempo; mi jam igos lin cedema!“

* *
*

Puno.

A.: „Kiom li donis al vi, la riĉa Goldhejmo?“

B.: „Aĉajn dek spesdekojn!“



A.: „La Eternulo lin punos ĝis lia morto!“

B.: „Li jam punis lin; mi ŝtelis al li arĝentan kuleron!“

* *
*

En vojaĝa vesto.

Edzino (ekvojaĝanta al banloko): „Nu, Julio, kiel mi plaĉas al vi en la nova vojaĝa vesto?“

Edzo: „En vojaĝa vesto, kara Laŭro, vi ĉiam plaĉas al mi plej bone!“

* *
*

Venĝo.


Vidvino de jurista konsilanto (al sia iama kuiristino): „Laŭ tio, kion mi aŭdis, vi edziniĝis, — kiun metion do havas via edzo?“

Kuiristino: „Tondil-akrigisto, sinjorino.“

Vidvino de jurista konsilanto: „Ĉu vere? Estas simpla metio!“

Kuiristino: „Nu, mi opinias, ke vivanta tondil-akrigisto valoras pli multe ol mortinta jurista konsilanto!“

* *
*



Nur kondiĉe.

„Ĉu vi vere volas pardoni al ĉiuj viaj malamikoj, vilaĝano?“

„Jes, via pastra moŝto, al ĉiuj mi volas pardoni, nur ne al Hansjorgo! Tiu tro multe ĉagrenis min.“

„Kampano, antaŭ Dio tio ne estos rajtiganta, kaj post la morto estas tro malfrue!“

„Nu, mi volas pardoni ankaŭ al li, se mi estas mortonta; sed se mi resaniĝos, la pardono ne valoros!“

* *
*

Necesa singardo.

„Do ne donu al la infano tiom da prunoj, — ĝi ricevos ventrodolorojn!“

„Ne domaĝos! Ĝi jam havas ilin.“


* *
*

Lasta provo.

Li: „Kara Anjo! Kio estas por ni la vivo — nur mizero. Se vi volas morti kune kun mi, prenu tiun ĉi pistolon!“ —

Ŝi: „Jes, karulo, mi volas. Unue mi mortpafos vin kaj poste vi min!“

* * *



Kompetentulo.

Aktorino: „Kara direktoro, mi devas peti de vi mian ekŝigon, ĉar la venontan semajnon mi edziniĝos je grafo.“

Teatra direktoro: „Sed kara infano, kial vi pro tio bezonas ekŝigi? Kelkmonata libertempo certe sufiĉos!“

* *
*

La kuracado.

Filino: „Panjo, venigu la asistanton de kuracisto, mi havas korbataĉon!“

Patrino: „Ho! tio ankaŭ ĉesos sen kuracisto.“

Filino: „Certe — sed tro enuige.“

* *
*


Konciza tosto.

La virinoj malpliigas nian doloron, duobligas nian ĝojon kaj triobligas niajn elspezojn. Ili vivu!

* *
*

Klare.

La filino de invitinta familio (mallaŭtege al sinjoro,



kun kiu ŝi koketis la tutan vesperon): „Venontan merkredon mi estos hejme la tutan posttagmezon.“

Sinjoro: „Mi ankaŭ!“

* *
*

Kondiĉe.

Profesoro: „Ĉu mi rajtas peti la favoron dediĉi tiun ĉi mian plej novan literaturan verkon al via moŝto?“

Moŝto. „Se mi ne devas legi ĝin — jes!“

* *
*

La plej simpla rimedo.


Kliento: „La lastaj cigaroj, kiujn vi donis al mi, estas sentaŭgaj. Ju pli oni proksimiĝas al la fundo de l' kesteto, des pli malbonaj ili fariĝas!“

Komercisto: „Vi ĉiam mallaŭdas ion. Turnu la kesteton kaj komencu preni de sube, tiam ili konstante pliboniĝos.“

* *
*

Stulta.

Juĝisto: „La akuzato al vi promesis rekompencan de 25 spesmiloj, se, kiel atestanto, vi farus deklaron



favoran al li? Kion li diris? Ripetu kion li diris, uzante liajn proprajn vortojn.

Atestanto: „Li diris, ke li donos al mi rekompencan de 25 spesmiloj, se mi atestos, ke“

Juĝisto: „Li certe ne parolis tiujn vortojn, li do ne nomis sin „li“, kiel oni diras pri tria persono!“

Atestanto: „Tria persono tute ne ĉeestis!“

Juĝisto: „Tion mi scias; sed kiam li parolis kun vi, li certe parolis laŭ formo de unua persono?“

Atestanto: „La unua persono estis mi“

Juĝisto: „Vi tute ne komprenas min: Kiam li parolis kun vi, ĉu li ne diris: Mi donos al vi 25 spesmilojn“

Atestanto: „Ne, sinjor' juĝisto, pri vi oni tute ne parolis!“


* *
*

Cedemo.

„Aŭdu, edzo! Mi intencas forvojaĝi 14 tagojn por distriĝi!“

„Ĉu vere? Nur 14 tagojn? mi estus al vi tre dankema, se vi forrestus pluajn 14 tagojn — por ke mi distriĝu!“

* *
*



Moderne.

Patro: „Nu, kara Friĉjo, kion vi diros, kiam via patro forvojaĝos por iom da tempo?“

Friĉjo: „Adiaŭ!“

* *
 *

Duspecaj opinioj.

Advokato: „Mi tre volonte akceptus vin por mia servo kiel skribisto, sed bedaŭrinde mi havas tre malmulton por fari.“

Skribisto: „Des pli bone, sinjor' doktoro!“

* *
 *


Karakterizaĵo de fraŭlo.

Laŭro (dum vesperfesto): „La jena sinjoro certe estas fraŭlo!“

Emilo: „Laŭ kio vi konkludas tion?“

Laŭro: „Ĉar li amindumas nur edzinojn!“

* *
 *



El la lernejo.

Religia instruisto: „Kion oni faras post kiam oni resaniĝas de danĝera malsano?“

Lernanto: „Oni postulas la kalkulon de l' kuracisto.“

* *
 *

Je l' naskiĝa festo.

„Jen sinjoro la barono sendas al vi kiel signon de sia granda amo malgrandan donacon.“

„Ho, la malon mi pli ŝatus!“

* *
 *

Inversa proporcio.

Ju pli malnova fotografiaĵo, des pli juna vizaĝo.


* *
 *

Post la teatra reprezentado.

A.: „Mi nur miras, ke oni ne fajfis dum la enuiga teatraĵo.“

B.: „Oscedante oni ja ne povas fajfi!“

* *
 *



Agrabla seniluziĝo.

„Pensu nur, hodiaŭ nokte mi sonĝis, kvazaŭ mi estus edzo. Sed kia agrabla sento, ĉe la vekigo, ke mi estis ankoraŭ fraŭlo!“

* *
*

Aforismo.

Vizitanto estas ĉiam agrabla, aŭ kiam li venas, aŭ kiam li foriras.

* *
*

Edzeca harmonio.

Kampano: „Nun mi vivas jam 20 jarojn kun mia edzino, sed neniam ni havis la saman penson. Nur unu solan fojon, kiam nia domo brulis, ĉiu el ni volis kiel unua tra la pordo.“


* *
*

Humoro de l' malgajeco.

Naci: „Pro Dio, Ŝorŝl, per kio vi havas la vangon ŝveliĝintan?“

Ŝorŝl: „Tiun? tio — tio estas virina manfaraĵo.“

* * *



Protesto.

A.: „Je kiu prezo ni ludos la kartludon Sesdek-ses?“

B.: „Ni ludu pro la honoro!“

A.: „Por kio al mi utilos via honoro, se mi gajnos ĝin?“

* *
*

Amiko de infanoj.

Dommastrino: „Ĉu vi amas infanojn, Sinjoro Wright?“

Anglo: „Ho mi tre amas infanojn, precipe kiam ili krias.“

Dommastrino: „Precipe kiam ili krias?“


Anglo: „Jes, jes! Tiam oni elportas ilin el la ĉambro.“

* *
*

Trafa respondo.

Edzino: „Ho, Anselmo, kiel malmulte amoplena vi nun estas al mi! Kiam mi ankoraŭ ne estis via edzino, vi min ĉiam nomis via „oro“, — ho, kiel longe mi jam ne aŭdis tiun nomon!“

Edzo: „Kiel mi povus diri „oro“ al mia edzino?“



— Oro ja por mi havas valoron nur kiam mi ĝin povas
interŝanĝi!“

* *
*

Trankviligo.

Patro: „Okaze de via naskiĝa festo, Sara, mi donacas
al vi ĉi-tiun perlan ornamaĵon!“

Sara: „Sed patro, ĉu vi do ne scias, ke perloj sig-
nifas larmojn?“

Patro: „Ne timu, tiuj ĉi signifas nenion, — ili estas
falsaj!“

* *
*

Rebatita.

„Mi deziras paroli kun sinjoro komerca konsilanto
Goldberger.“


„Li ne estas hejme.“

„Sed vi ja ankoraŭ tute ne scias, kion mi volas!“

* *
*

Reciproke.

„Ĉu vi ĉiam ankoraŭ koleras kontraŭ mi, kara ko-



lonelo, ĉar lastan karnavalon mi rifuzis vian edziĝpeton?“

Nu depos tiu tempo mi ŝanĝis mian opinion!“

„Mi ankaŭ, grafidino!“

* *
*

Malegoista.

La ĉefo (surprizante sian komizon, kiu dum la
kontora horaro amindumas sian filinon): „Sed sinjoro
Miler, kion mi vidas, — ĉu mi pagas al vi por tio?“

Komizo: „Ne, tion mi faras senpage!“

* *
*

Sola escepto.


„Kiom nur babiladas la virinoj; mi kredas, ke ili
povas gardi nenian sekreton!“

„Tamen — unu!“

„Kaj tio estas?“

„Ilian aĝon!“

* *
*



Eliĝinta el la kaptilo.

(En bonfara bazaro.)

„Fraŭlino: „Sinjoro, vi certe aĉetos de mi tiun ĉi malgrandan bukedon!“

Sinjoro: „Volonte, fraŭlino! Kiom ĝi kostas?“

Fraŭlino: „Nu, ni diru io spesmilojn!“

Sinjoro: „Fraŭlino, tio estas tro multekosta por mi!“

Fraŭlino: (premante kison sur la bukedon): „Kaj nun, sinjoro?“

Sinjoro (forturnante sin): „Nun ĝi estas nepagebla por mi!“

* * *

Decidema.

Majer: „Sed kara infano, vi ree serĉas servon, kvankam dum la mallonga tempo de 2 semajnoj vi havis tri geestrojn?“


Servistino: „Jes, sinjora moŝto, mi havis la mal-feliĉon, ke ĉiufoje tuj post mia ekservado mortis la sinjorino!“

Majer (al sia edzino): „Adelo, ŝin ni dungos!“

* * *

Unu kaj alia.

„Vidu, kara edzino, tiu sinjoro kaj mi estis dum la



universitata tempo nedisigeblaj amikoj, kaj kiam unu ne havis monon, li senskrupule uzis la monujon de l' alia! Cu ne, sinjoro Lebreĥt?“

„Certe, certe, mi tion memoras tute bone, ĉar mi ĉiam estis la alia!“

* * *

Bona respondo.

Kuracisto: „Kion vi faras, infanoj?“

Knabo: „Ni ludas »enterigo«n!“

Kuracisto: „Ĉu vere? Kiun do vi enterigas?“

Knabo: „La urbestron!“

Kuracisto: „Ho, ho, je kio li suferis?“

Knabo: „Li ne fartis bone!“


Kuracisto: „Ĉu vi antaŭe ne venigis kuraciston?“

Knabo: „Ne — ni mem mortigis lin!“

* * *

Floroj kaj frukto.

Filino: „Vidu, patro, la belegan bukedon, kiun kapitano Pleŝner ree sendis al mi. Cu li ne estas mal-
avara homo?“



Patro: „Kial malavara! Li sendas florojn, ĉar li volas havi la frukton!“

* *
* *

Kuracista bonfaro.

Sinjoro: „Ho, sinjor' doktoro, ĉu vi faros malgrandan vojaĝon?“

Kuracisto: „Jes, miaj pacientoj devas do ankaŭ iom distriĝi!“


* *
* *

Granda komercejo.

A.: „Mi nur bezonas diri, ke en nia komercejo ni foruzas ĉiujare inkon por preskaŭ 400 spesmiloj. Kion vi nun diras?“

B.: „Dio! Kion signifas, ke vi ĉiujare foruzas inkon por 400 spesmiloj? Ni ŝparas ĉiujare inkon por 400 spesmiloj, nur ĉar ni forlasas la supersignojn super i kaj u.“

* *
* *



Privilegio de riĉeco.

„Certe al vi estos tre agrable, sinjorino de komerca konsilanto, ornami tiun ĉi belan salonon per kelkaj bonaj oleaj pentraĵoj. Mi posedas tie ĉi kolekton de malnovaj pentraĵoj de famekonataj majstroj je moderaj prezoj.“

„Malnovaj pentraĵoj! Kial malnovaj pentraĵoj! Dank' al Dio ni estas sufiĉe riĉaj por aĉeti novajn!“

* *
* *

Kafo aŭ teo.

Studento: „Ĉu vi permesas la demandon, kara mastrino, ĉu tio estis kafo aŭ teo, kion hieraŭ vespere vi alportis al mi?“


Mastrino: „Mi ne komprenas vin, sinjoro Ŝlegel . . .“

Studento: „Tio ankaŭ ne estas necese. Mi nur volas peti vin, en okazo ke ĝi estis kafo, estonte doni al mi tason da teo. Sed se ĝi estis teo, estonte mi preferas kafon.“

* *
* *

Ruzo de servisto.

„Kial vi pakas la cigarojn de l' barono en la botojn?“



„Ĉar, alveninte en Baden-Baden, la barono certe diros: Kiel vi, kamelo, povas paki la cigarojn en la botojn — nun vi mem fumu ilin!“

* *
*

Bela ŝanco.

Princido: „Diru kial ankoraŭ ĉiam la mortinta hundeto de mia patrino staras en ŝia saloneto?“

Edukisto: „Via principida moŝto scias, ke via plej moŝta patrino tre amis la hundeton; ĉar ĝi nun mortis, sed ŝia moŝto ne volas malhavi la besteton, la malgranda karulo de ŝia moŝto estis konservata plenŝtopite.“

Princido: „Kiam vi estos mortinta, mi ordonos, ke vi ankaŭ estu plenŝtopata.“


* *
*

Lasta deziro.

Pastro (al grave malsana vilaĝano): „Nu, kara vilaĝano, se vi ankoraŭ ion deziras, parolu!“

Vilaĝano: „Jes, via pastra moŝto, mi deziras resaniĝi.“

* *
*



Tre flateme.

Sinjoro: „Ĉu vi scias, plej estimata fraŭlino, ke ni havas hodiaŭ la plej mallongan tagon de l' jaro?“

Fraŭlino: „Vere! Sed dum via ĉeesto oni tute forgesas tion!“

* *
*

Efika rimedo.

Kuracisto (al babilema sinjorino): „Montru al mi vian langon!“ (La sinjorino obeas.) „Bone, kaj lasu la langon ekstere ĝis mi ĉesis paroli.“

* *
*

Bona informo.


„Ĉu la sinjora moŝto estas hejme?“

„Ne!“

„Kiam li revenos?“

„Kiam la sinjora moŝto ne volas esti hejme, oni ne scias, kiam li revenos!“

* *
*



Malice.

Dresisto: „Fine mi montras al vi grandegan testudon. Tiu-ĉi besto povas porti la plej pezajn ŝarĝojn sur sia dorso. Se iu el la gesinjoroj volas starigi sin sur ĝin“

Edzo: „Edzino, metu vin sur ĝin!“

* *
*

Vana konsilo.

Kuracisto: „Ion ankoraŭ mi urĝe konsilas al vi: „Ne trinku tro multe da biero!“

Paciento: „Ho, sinjor' doktoro, ne zorgu pri tio — por mi ĝi neniam estas tro multe!“

* *
*

Neniu talento.


„Makso, ĉu vi ne dezirus iam fariĝi kuracisto?“

„Ne!“

„Kial ne?“

„Ho, mi ja ne povus mortigi eĉ muŝon!“

* *
*



Honesta trovinto.

„Kion vi farus, se vi trovus 25000 orajn spesmilojn?“

„Mi — mi donus al la bona homo, kiu perdis ilin, 250 spesmilojn, kiel rekompencon!“

* *
*

Sufiĉa provo.

A.: „Ĉu vi venos kun mi en la teatron? Oni prezentos hodiaŭ novan teatraĵon: »La virinoj, kiaj ili ne devas esti!“

B.: „Dankon, tion mi konas sen tio.“


A.: „Ne eble, oni prezentos ĝin hodiaŭ la unuan fojon!“

B.: „Jes, sed iam la duan fojon mi estas edzo!“

* *
*

La juna mastrino.

„Sed kara edzino, tiu ĉi bovidaĵo estas malmola, vere nemanĝebla!“



„Tiel mi ankaŭ juĝas, kara edzo, certe la viando devenas de maljunega bovido!“

* *
*

Je fremdaj kostoj.

Mallerta, fervora Nimrod' iras ĉasi, sed malfeliĉe havas nenian okazon por ion trafi. Plej malĝoja li iras hejmen. Li venas al domo, kie staras vilaĝano apud kelkaj kokinoj. Nimrod' ne povas kontraŭstari la tenton kaj diras al la vilaĝano:

„Aŭdu, mia kara, kion mi devos doni al vi, se vi permesos al mi, pafi al la kokinoj?“


„Nu, donu 2 spesmilojn!“

Nimrod' donas la postulitan monon, pafas, kaj la kokinoj falas je ĉiuj flankoj. Nur nun li pripensas, ke la kontrakto nur estas duone farita, kaj demandas la vilaĝanon:

„Ĉu mi nun povas kunpreni la kokinojn?“

„Mi ne malkonsentas — al mi ili ne apartenas, mi estas fremda tie ĉi.“

* *
*



Bona filo.

En gastejo sidas tri amikoj; filo de kuracisto, filo de tajloro kaj disciplo de Merkuro. La lasta ekbruligas per la cigaro sian pantalonon, ne rimarkante tion, la dua aliaj rigardas silente. Kiam fariĝis granda truo kaj la tajloro certe povis atendi laboron, li atentigas la alian. Kolere la filo de l' kuracisto diras al la tajloro: „Se vi estus lasinta ĝin bruli ankoraŭ iom, mia patro ankaŭ estus ion profitinta per tio!“

* *
*

Rebatite.


Gustumanto: „Kiel? mi kredis, ke filozofoj kaj geniuloj ne tre ŝatas bongustaĵojn!“

Scienculo: „Ĉu vi eble kredas, ke ili ekzistas nur por idiotoj?“

* *
*

La helpanta kolono.

Studento: „Sinjoro profesoro, mi petas vin, atesti al mi, ke mi estas partopreninta vian kurson pri logiko.“



Profesoro: „Sed mi neniam vidis vin.“

Studento: „Mi ĉiam sidis malantaŭ la kolono!“

Profesoro: „Ĉu vere? Vi estas jam la dekdua, kiu ĉiam sidis malantaŭ la kolono!“

* *
*

La superfluo.

Sinjoro: „Volu ekspedi jenan telegramon: Karlo Buršel, Linz! Kun malĝojo mi sciigas, ke onklo Petro mortis hodiaŭ je apopleksio. Espereble ni heredos de li! — Via frato Johano!“

Oficisto: „Estas du vortoj tro multaj, kiujn oni devas forstreki!“


Sinjoro: „Forstreku: — kun malĝojo!“

* *
*

Delikata averto.

Grafino: „Sed sinjoro generalo, fine vi nun devus edziĝi.“

Generalo: „Kial, grafina moŝto?“



Grafino: „Ho, — estus do domaĝe pro la bona pensio de generala vidvino!“

* *
*

Patra averto.

(Patro kaj filo en la kvara rango de l' teatro.)

Patro: „Atentu, Davido, ke vi ne falu malsupren en la parteron — tie ĉiu seĝo kostas 2 spesmilojn.“


* *
*

Nepardonebla.

(De iu viro forkuris lia facilanima edzino, sed post longa vagado ŝi revenas.) Ŝi: „Kara edzo, ĉu vi pardonas al mi, ke mi forlasis vin?“

Li: „Jes, tion mi pardonas, sed ke vi revenis, tion mi ne povas pardoni. Adiaŭ!“

* *
*



Trankviligo.

Fianĉo: „Mia kara Vando, mi devas konfesi al vi ion: mi ofte koleretas tute senkaŭze.“

Fianĉino: „Ho, la kaŭzoj ne mankos al vi!“

* *
*

Konsideranta knabo.

„Ne plaĉas al mi, Karlo, ke en la lasta duonjaro vi tiel malmulte progresis. Lastan jaron mi treege ĝojis, ĉar vi venis hejmen kun la unua premio.“


„Sed vidu, panjo, alia patrino do ankaŭ iafaje volas ĝoji!“

* *
*

Por la estonteco.

Pastro festas la bapton de sia dekkvina infano. Kiel kutime, sur la tablo staras grandega bapto-kuko. „Kara edzino“, diris la pastro mediteme, „hodiaŭ la kuko tute ne estas bongusta laŭ mia opinio. La proksiman fojon ni iru al alia bakisto.“

* *
*



Raporto.

„Nu, ĉu la urbo estas trankvila?“

„La urbo estas trankvila, sinjoro kolonelo, nur la homoj bruas kaj ribelas!“

* *
*

Unu kiel alia.

„Kion vi pagos al mi por tiu-ĉi poŝhorloĝo kun ora ĉeno?“

„Se vi povas pruvi ĝian honestan akiron, tridek spesmilojn, en alia okazo sep.“

„Donu la sep spesmilojn!“

* *
*


Blindulo.

„Mi petas almozon, sinjoroj, por mizera blindulo.“

„Kie do estas la blindulo?“

„Li staras ekstere antaŭ la pordo, por rigardi, ĉu ne venas policisto!“

* *
*



Valorprovo.

„Patro, kiel oni ekkonas la diferencon inter falsaj perloj kaj malfalsaj?“

„Tute simple. Oni portas ilin al pruntejo, kiel pruntgarantiaĵon — se la perloj estas falsaj, oni ne akceptas ilin tie.“

* * *

Komplimento.

„Kara barono, pardonu, ke mi ĉiam devas ridi, kiam mi diris ion malsaĝan.“

„Ho, volonte, grafino; tial vi ankaŭ la tutan tagon estas en gaja humoro!“


* * *

Dubema rekomendo.

„Ĉu vi konsilas al mi, akcepti sinjoron Ŝnurbrumer kiel advokaton? Ĉu oni juĝas lin lerta advokato?“

„Certe. La proceso, kiun li ne konfuzas, devas jam esti tre klara!“

* * *



Propono paciga.

„Se vi ne tuj pagos la lumonon, kiun vi ŝuldas al mi depost jaroj, mi procesos kontraŭ vi.“

„Ho, ne faru al mi tiun malhonoron, — prefere plialtigu la luprezon!“

* * *

Programstilo.

Per la eniro de sinjoro la urbestro la bestekspozicio estas malfermita.

* * *

La nova guvernistino.


Patrino: „Linjo, estu ĝentila, kaj donu kison al fraŭlino Anjo, antaŭ ol vi kuŝiĝos.“

Linjo: „Jes, por ke ŝi donu ankaŭ al mi vangfrapon, kiel hieraŭ vespere al la patro!“

* * *

Homkonanto.

Konsilanto: „Jozefo, rapide alportu mian palton, mi devas foriri.“



Jozefo: „Pardonu, sinjoro konsilanto, kien vi iros?“

Konsilanto: „Al la kunsido.“

Jozefo: „Ĉu mi ne tuj devas alporti la dormveston?“

* *
*

Amika konsolo.

(Viro sidas malĝoja kaj meditema sur benko, lia amiko staras antaŭ li kaj diras): „Kio okazis al vi? Pri kio vi meditas? Pro kio vi tiel ĝemas?“

La malĝojulo: „Pro mi mem!“

La alia: „Malsaĝulo! Kiu estos tiel malsprita por mediti pro nenio!“


* *
*

Rajtigita ĉagreno.

„Kara infano, kial vi estas tiel malĝoja? Ĉu via karulo ankaŭ formarsi?“

Knabino (ekĝemante): „Ho jes! — Ĉiuj kvin!“

* *
*



Bone pripensitaj improvizaĵoj.

El malbonkvalitaj mangaĵoj la plej bonaj estas tiuj, de kiuj oni plej malmulte manĝas.

Kiom da viroj dezirus esti fraŭloj, por povi trompi senmalhelpe siajn edzinojn!

* *
*

Bona obeo al la leĝo.

Imposta oficisto: „Sinjoro, vi fumas importitajn cigarojn. Ĉu vi ne scias, ke tio estas malpermesite?“

Vojaĝanto: „Certe mi tion scias. Ĉu vi ne vidas ke mi ilin neniigas per fajro?“


* *
*

La flavaj kaj la blankaj butonoj de uniformo.

Kaporalo: „Majer, diru, kial la diversaj regimento portas aŭ flavajn aŭ blankajn butonojn?“

Majer: „Por butonumi, sinjoro kaporalo!“

* *
*



Stranga titolo porvizita.

Almozpetanto, kiun oni ne volis enlasi al la barono Rinaldo, petis la pordiston, diri al la barono, ke la bopatro de Dio deziris paroli kun li. Scivola pro tiu ĉi sciigo, la barono venigis lin kaj demandis, kiel li povas esti tiel aroganta por anonci sin tiel. La almozpetanto respondis trankvile: „Sinjoro barono, estas tute vero. Mia bopatro havis du filinojn, unu el ili prenis mi, la alian nia Dio.“

* *
*

La bona gvidanto.


Vojaĝanto: „Aŭdu! Kie oni iras al la katedralo?“

Soldato: „Iru rekte antaŭen, kaj ĉe la angulo demandu pri la botisto Hofmajster: tute apude troviĝas la katedralo!“

* *
*

Infana deziro.

Patro: „Kiam nun baldaŭ venos la cikonio, kara Rudolfo, kion vi deziras, frateton aŭ fratineton?“



Fileto: „Se tio al vi estas egale, kara patro, mi preferus ĉevaleton balancan.“

* *
*

La senluziigita virtuozo.

Princo: „Mi jam vidis multajn virtulojn, eĉ tre multajn, sed“

Virtuozo: „Ho, princa moŝto!“

Princo: „Sed neniu ŝvitis tiom, kiom vi!“

* *
*

La nigraj kaj la blankaj ŝafoj.


Profesoro: „Via subŝafisto al mi diris, ke la nigraj ŝafoj manĝas pli malmulte ol la blankaj. Verŝajne li nur mensogis al mi?“

Ŝafisto: „Tute ne!“

Profesoro: „Kiel do povas esti?“

Ŝafisto: „Jes, sciu, estas pli da blankaj ol da nigraj en la ŝafaro.“

* *
*



Infana ludo.

„Sed Karlo, kian bruon vi faras? Mi eĉ kredas, ke vi batis vian fratineton; ŝi ja ploras. Vi do estas tre malĝentila!“

„Ne, onklino, mi ne estas neĝentila; Luizo kaj mi nur ludis »patro kaj patrino«!“

* *
*

Antaŭzorgego.

Li: „Nu, kara Klotildo, ĉar ni amegas unu la alian, vi do donos al mi libervole kison?“

Ŝi: „Ne Teodoro! Kion dirus la homoj?“

Li: „Ho, en la tuta ĉirkaŭaĵo estas neniuj, kiu povus spioni nin!“


Ŝi: „Sed Dio supre nin vidas!“

Li: „Estu trankvila, karulineto, ankaŭ por tio mi zorgis.“ (Malfermas pluvombreton).

* *
*

La solfanta gasto.

Patro (al filino): „Emilio, kial vi ne enverŝas vinon al la kuzo?“



Emilio (duonlaŭte): „Ne penindas, patro, kiam mi plenigis la glason, li tuj malplenigas ĝin!“

* *
*

Senkulpa doloro.

Majstro: „Kial do vi ploras? — Ĉu vi sopiras al via patrino?“

Lernanto: „Ho ne, majstro, mi nur ploras pro la bovo, kiun oni mortigis pro la maldika peceto da viando sur mia telero.“

* *
*

Drinkemo sanigebla.


„Oni ja ne vidas vin plu en la drinkejo!“

„Ne mi ne emas plu drinkadon: post kiam mi antaŭ ne longe venis hejmen ebria kaj vidis mian edzinon duoble! Tio certe dekutimigas de l' drinkado!“

* *
*

Ŝparema dommastrino.

Kuiristino: „Sinjorino, kiom da ovoj mi devas preni por la supo?“



SinJORino: „Kvar! De du prenu la blankaĵon kaj de du la flavaĵon!“

* *
*

Karesa zorgemo.

„Kara Henriko, vi do vestis vin varme? Mi tiel zorgegas pro vi; oni diras, ke lastan semajnon ankaŭ frostmortis bovo en la vagonaro.“

* *
*

La malĝoja motivo.

Morico: „Kial do vi estas nigre vestita, kara Edvardo? Ĉu pro ĝoja aŭ malĝoja motivo, pro balo, vizito aŭ pro entombigo, kion mi ne esperas?“


Edvardo: „Ne pro tio, mi hodiaŭ festas mian fianĉiĝon!“

Morico: „Do tamen malĝoja motivo.“

* *
*

La familia reprezentado.

„Sed amiko Bulert, via vestaĵo diferencas tro multe de tiu de via edzino. Ŝi estas tiel pompe vestita!“



„Jes, kara barono, jen la reprezentado de l' domo: mia edzino sin vestas laŭ la (mod) ĵurnalo kaj mi laŭ la ĉeflibro.“

* *
*

Praktika solvo.

(Sceno el la lerneja ekzameno). „Ĉu vi scias, infanoj, kio estas frakcio? Diru, Karlo: supozu, ke vi kun via fratino preteriras arbon kaj trovas pomon. Nun vi deziras, ke via fratino ricevu tiom kiom vi. Parolu: kion vi faros?“


„Mi malsupren faligos alian pomon!“

* *
*

La malforta loko.

Profesoro: „Vi do vidas, sinjoroj, ke la homa korpo, ŝvitas plej multe tie, kie troviĝas la plej malforta loko.“ (Fino de la legado).

Studento (elirante el la aŭditorio): „Sinjoro profesoro,



vi tre varmîgas; ne malvarmumu! Vi treege ŝvitas sur la kapo!“

* *
*

La plej bona barometro.

„Ĉu vi povas diri al mi, kie oni aĉetas bonan barometron?“

„Mi povas rekomendi al vi mian botiston. Li faras tiel mallarĝajn botojn, ke oni certe haviĝos kalojn, kaj tiuj estas la plej bonaj barometroj.“

* *
*

Granda malkompreno.


Direktoro (al bienposedanto): „Do la teatraĵo amuzas vin? Ho, ekzistas multe da pli belaj! Ĉu vi ne konas la »Barbiron de Sevilla«?“

Bienposedanto: „Ne, mi ne konas lin, mi min razas mem.“

* *
*

La ĉevalspertulo.

„Nu sinjoro N., kion vi opinias pri la ĉevalo?“



„Hm, hm, se ĝi aspektus de la malantaŭa parto tiel, kiel ĝi devus aspekti de la antaŭa, ĝi estus bela besto!“

* *
*

Eĥo.

Kiuj estas por la mondo la plej danĝeraj insektoj?

Eĥo: „Sektoj!“

* *
*

Frapanta simileco.

Multsemestra studento: „Ĉiutage mi trovas ĉe vi frapantan similecon inter viaj bonaj ideoj kaj viaj ĉemizaj butonoj“.


Unusemestra studento: „Kial?“

Multsemestra studento: „Ambaŭ kutime mankas al vi.“

* *
*

Malhonoriga puno.

Instruisto volis puni knabon, kiu kondukis malĝentilege kontraŭ li, per aparta maniero instiganta la am-



bicion, kaj diris al li: „Vi fiknabo ne estas inda sidi inter la aliaj lernantoj. Depost nun vi sidos tie ĉi apud mi!“

* *
*

Rakonteto el Turingujo.

(Post la kunsido.)

Servisto: „Kion vi serĉas, sinjoro konsistoria konsilanto?“

Konsistoria konsilanto: „Mian ĉapelon!“

Servisto: „Jen via ĉapelo!“

Konsistoria konsilanto: „Tio ne estas mia!“

Servisto: „Pardonu, sinjoro konsistoria konsilanto, mi brosis ĝin iomete!“

* *
*


Spiritĉeesto.

Vilaĝano: „Sciu, fraŭlino kuiristino, mi procesas kontraŭ mia najbaro, tial mi pensis, ke mi alportu ion al sinjoro la juĝisto por liaj infanoj.“

Kuiristino: „Jes, sed sinjoro la juĝisto ne havas infanojn.“

Vilaĝano (post iom pripenso): „Nu, tiam diru, ke tio estas por liaj nepoj!“

* *
*



En la laborĉambro de l' avo.

Johano (al Karlo): „Vi estas granda azeno!“

Karlo: „Kaj vi eĉ multe pli granda!“

Avo: „Silentu! Vi babilas kvazaŭ neniu alia estus en la ĉambro!“

* *
*

Dum pensiona tagmanĝo.

Direktoro: „Kiu nun manĝos plej multe da terpomoj, poste ricevos la plej grandan pecon da viando!“ (Granda silento. La knaboj manĝas fervorege). Kiu el vi nun estas tute sata?“

Ĉiuj: „Mi, mi, mi!“

Direktoro: „Tiam vi nun ne bezonas viandon, ni konservu ĝin por morgaŭ!“

* *
*


Turistoj eĉ ŝosea impostejo.

A.: „Vi estas azeno!“

B.: „Kaj vi perfekta bovo!“

C.: „Ŝŝ! Se la ŝosea impostisto aŭdos viajn titoladojn, vi devos pagi ŝosean imposton kiel kvarpieduloj!“

* *
*



La piedbano.

Virino: „Aŭdu, sinjoro doktoro, ĉu ne estus bone por mia edzino, se li uzus piedbanon?“

Kuracisto: „Jes, vi povas doni al li piedbanon!“

Virino: „Ĉu vi ne opinias, ke estus bone, enverŝi iom da vinagro?“

Kuracisto! „Ĝi ne malutilos.“

Virino: „Kaj iom da cindro?“

Kuracisto: „Ne estos malbone.“

Virino: „Kaj iom da salo?“

Kuracisto: „Ankaŭ ne faros malbonon.“

Virino: „Kaj kiel alte la nivelon, sinjoro doktoro?“

Kuracisto (kolere): „Ĝis la buŝego alie li dronus!“

* *
*

Distreco.


„Sed sinjoro profesoro, vi prenas la rostaĵon per la fingroj!“

„Ho, pardonu, mi kredis, ke ĝi estas spinaco.“

* *
*

La ombroludo.

Majoro (al leŭtenanto): „Sinjoro leŭtenanto, vi restos tie ĉi kun via taĉmento!“



Leŭtenanto: „Jes, sinjoro majoro!“

(Unu horon poste.)

Majoro (kolere): „Sinjoro leŭtenanto, mi ordonis al vi, ke vi restu ĉe la sama loko!“

Leŭtenanto: „Pardonu, sinjoro majoro, mi ne forlasis la lokon.“

Majoro: „Silentu! Mi scias tion pli bone. Mi lokis vin en sunlumon kaj nun vi estas en ombro!“

* *
*

Malfrua efiko.

A.: „Ĝis nun mi sentas nenian efikon de mia kuracado per malvarma akvo.“

B.: „Tio ne helpas tuj; — mi konis sinjorinon, kiu mortis nur post duonjara kuracado!“

* *
*


Bona konatulo.

Sinjoro: „Diru al via sinjoro, ke mi estis tie ĉi!“

Servisto: „Ĉu mi povas peti vian ŝatatan nomon?“

Sinjoro: „Ne necese, li jam konas min!“

* *
*



La bonaj faroj.

Johano: „Nu, Kasparo, vi do venas de la konfeso?
— Kion vi konfesis?“

Kasparo: „Kion mi konfesis? Ke mi batis mian
edzinon!“

Johano: „Kion la pastro diris pri tio?“

Kasparo: „Kasparo, li diris, silentu pri viaj bonaj
faroj, konfesu nun viajn pekojn!“

* *
*

El kateĥismo.

Pastro: „Doni estas pli feliĉige ol akcepti. Kiel
oni devas kompreni tion? Petro, diru, kiel vi ĝin kom-
prenas!“

Petro: „Ho, tion mi bone komprenas.“


Pastro: „Nu, diru al mi ekzemplon. Kiamaniere
estas pli bone: doni ol ricevi ion?“

Petro: „Estas pli bone doni vangfrapon ol ricevi
ĝin!“

* *
*

Ekzamena sceno.

Generalo (ekzamenante la soldatojn): „Nu, diru:



kion vi pensos, se vi iam vidos en batala kampo vian
flagon tiel flirteganta?“

Rekruto: „Ke blovas vento, sinjoro generalo!“

* *
*

Patro fiero.

(Kvin minutojn post la naskiĝo de l' unua filo.)

Leterportisto: „Mi havas leteron por sinjoro Fajgl-
ŝtok.“

Fajglŝtok: „Por kiu? Por la maljuna aŭ la juna?
Ekzistas nun du!“

* *
*


Instruo.

Judo (sidiĝinta ĉe gasteja tablo, ĉe kiu sidas kelkaj
kadetoj, el kiuj unu imitas lin): „Kara sinjoro kadeto,
kial vi imitas malriĉan judon? Kiom tio utilas al vi?
Preferu imiti Moltke'on!“

* *
*

Suspektinda.

„Mi gratulas vin okaze de via fianĉiĝo. De kie
estas via fianĉino, kara amiko?“



„Mi dankas vin, ŝi estas el la ĉirkaŭaĵo de Kempten!“

„Ho ve, neniigu la aferon!“

„Kial?“

„Mia edzino estas el la sama regiono!“

* *

*

Tre kuraĝiga.

„Ĉu vi povas diri al mi, kie loĝas la kuracisto?“

„Jes, eniru tiun ĉi strateton, poste flankturnu je la angulo, — tiam vi jam aŭdos la homojn kriantaj.“

* *

*

Malbona regiono.

Sinjorino: „Ho, kiel plena de floroj estas tiu ĉi persikarbo! Vi havos bonan rikolton.“


Vilaĝano: „Ho Dio! en tiu ĉi regiono ili maturiĝas neniam.“

„Sinjorino: „Ĉu do la klimato estas tiel malfavora tie ĉi?“

Vilaĝano: „Ne, sed la buboj jam manĝas la fruktojn, dum ili estas ankoraŭ nematuraj.“

*

* *



Spiritĉeesto.

Edzino de restoraciestro kaptas sian edzon, dum li kisas la kelnerinon en malluma koridoro. Spiritĉeeste la mastro ekkrias: „Kiu do estas tiu, kara edzino — mi opiniis, ke vi estas tiu — tuj mi devas alporti lanternon!“

* *

*

Dormigilo.

Izako (meznokte al sia kundormanto Jakobo): „Se mi nur scius, kion mi devas fari, — mi povas dormi nenian nokton pro multaj zorgoj, devante morgaŭ pagi kambion de 300 spesmiloj al la Herŝ!“

Jakobo: „Volas mi doni al vi konsilon: Leviĝu, surmetu vestojn, iru al la Herŝ, vekigu lin, kaj diru al li, ke vi ne povos pagi la kambion. Tiam li havas la zorgon, vi ĝin senigis kaj povas ree dormi!“

* *

*


Ekkonita.

„Ĉu mi ne povas paroli vorton kun vi sola?“

„Ĉu la vorto estas — mono?“

* *

*



Pliiĝo.

Emilino (al sia amikino Marta): „Ĉu ne vere, la sinjoro doktoro estas tre enuiga? Ĉiam li dormas — eĉ en societo de sinjorinoj!“ —

Marta: „La dormado estas elportebla; tamen kiam li vekigās, li estas ankoraŭ pli enuiga.“

* *
*

Naskiĝa festo.

Patro (gratulante al sia trijara fileto pro naskiĝtago): „Nu, Haĉjo, mi gratulas al vi!“


Haĉjo: „Koran dankon paĉjo . . . ĉu vi ankaŭ lernis parkere verson?“

* *
*

Miksita laŭdo.

Ĉefo (al komizo): „Juna viro, dum ses semajnoj vi estas en mia servo; via konduto, ankaŭ viaj scioj estas admirindaj, tamen kion mi plej multe admiras, estas via precizeco per kiu vi ĉiutage malfruiĝas je duonhoro.“

* *
*



Analogio.

„Kial vi kritikas vian edzinon? Ŝi ja estas tiel bela!“ —

„Rigardu do mian ŝuon—ĉu ĝi ne estas ankaŭ bela?“

„Certe!“

„Vidu, kaj tamen ĝi premas min!“

* *
*

Sugestia.

Kartdivenistino: „Juna, bela viro inklinas al vi. Li amas vin. Vi ricevos tri infanojn.“


„Kaj pri la edziĝo la karto nenion montras?“

* *
*

La mensogbreto.

En la manĝaĵejo fruktoj estas ŝtelitaj. Suspektataj estas Peĉjo kaj Naĉjo. Ambaŭ malkonfesas. Por ekscii la veron, la patro uzas jenan rimedon: Li prenas breton, kuŝigas ĝin meze de ĉambro kaj diras: „Tiu-ĉi breto kapablas rompi la kruron al la mensoganto transsaltanta ĝin. Antaŭen, buboj, transsaltu ĝin!“ Peĉjo kaj Naĉjo faras tion, senakcidente transsaltas kaj diras al sia patro: „Nu, ni ne rompis kruron, — nun vi provu tion patro!“

* *
*



Naiva.

„Panjo, estus tre bele, se mi havus ankoraŭ unu fratineton — mendu do unu ĉe la cikonio!“

„Sed, Linjo, kion dirus la paĉjo?“

„Ho, tiun ni ne demandos pri tio!“

* * *

Infana konkludo.

„Onklino, kio estas telegrafo?“

„Telegrafo estas objekto, kiu ricevante sciigon ĉi tie, tuj ĝin transigas en Berlino.“

„Ho, ĉu vere, tiam vi estas telegrafistino?“

„Kial?“


„Sciu, paĉjo diris hieraŭ al panjo: Diru nur nenion pri tio al la onklino, alie la tuta urbo tuj ĝin scios!“

* * *

En la vendejo de gantoj.

„Fraŭlino, mi petas vin, ne vendu estonte al mia mastro gantojn numeron 7¹/₂, sed anstataŭe numero 8.“

„Ĉu tio ne estas al vi tute egale?“



„Ho, tute ne; ĉar kiam vi vendas al mia mastro gantojn numero 7¹/₂, tiam mi ne povas ilin porti!“

* * *

Sensukcesa mistifiko.

(Edzo revenanta hejmen el restoracio tre malfruiĝas. Por ke la edzino nenion rimarku, li sensuigas sin kaj silente ŝteliras sur la piedfingroj en la ĉambbron, sed — ho ve! — la edzino ekvekiĝas. Rapide li aliras la lulilon de sia ununaskito, lulas kaj kantas al li lulkanton.)

„Kion vi nur faras, Karlo?“

„Mi sidas jam dum 2 horoj ĉi-tie por endormigi la knabon.“

„Sed, Karlo, li ja kuŝas ĉe mi en la lito!“


* * *

Prava.

Kuracisto: „Sed, bona amiko, kial vi ne tuj venigis min?“

Paciento: „Sed kion utilas al mi la kuracisto, se li unue savas al mi la vivon kaj poste sendas kalkulon, pro kiu mi devas mortĉagreniĝi?“

* * *



Bela songo.

Laŭra: „Ho, panjo, se tiu libro estus reala okazaĵo kaj mi fariĝus la malfeliĉa Aŭrelia!“

Panjo: „Kial vi deziras tion, filino mia?“

Laŭra: „Ho, ĉar Aŭrelia tamen edziniĝas—laŭ la lasta paĝo de la romano!“

* *
*

Ĝusta tempo.

Dua skribisto: „Nu, sinjoro kolego, vi ja volis forpermeson 4 semajnan — kial vi nun ne forpermesiras, kiam estas nur malmulte por labori!“


Unu skribisto: „Mi do ne petos forpermeson, kiam estas malmulte por fari; mi uzos ĝin, kiam estos multe por labori!“

* *
*

Progreso de tempo.

En Korano oni legas: La viro rajtas elekti patrinojn por siaj infanoj.

En Ameriko oni diras de post nelonga tempo: La virino rajtas elekti patron por siaj infanoj.



Kaj estonte oni verŝajne diros: La infanoj havas la rajton, elekti siajn estontajn gepatrojn!

* *
*

Nevaloraj senkulpiĝoj.

„Kial vi tiel malfruiĝis en la oficejo, sinjoro praktikanto?“

„Mi petas bonvolan pardonon, sinjoro konsilanto, hieraŭ mi ĉe-estis balon de oficistoj, kaj pro tio mi devis hodiaŭ pli longe dormi.“

„Nevaloraj senkulpiĝoj, dormi vi povis ankaŭ en la oficejo!“


* *
*

Malgranda rekompenco.

Sinjoro aktisto, vi jam faris al mi tiom da bonaĵoj, jen mi alportas al vi malgrandan rekompencon.“

Aktisto (rapide forprenante al la kamparano la ŝinkon kaj ĵetante ĝin malantaŭ la fornon): „Malfeliĉa kamparano, ĉu vi pensas, ke vi povas min subaĉeti? For la ŝinkon kaj rapide eliru!“

* *
*



Trafa respondo.

Princo: Diru al mi, kara Ŝulco, kial en ĉi-tiu regiono tiom da infanoj kuras nudpiedaj?''

Ŝulco: „Via princa moŝto, nudpiedaj ili naskiĝas ĉe ni.“

* *
*

Bona kontraŭdiro.

Edzino (al sia edzo revenanta je la 5-a matene el restoracio): „Nu, kara edzo, ĉu ankaŭ vi jam revenas hejmen?''


Li: „Jes, kara edzineto, al mi ne plu plaĉis en la restoracio!''

* *
*

Juna dommastrino.

„Lenjo, kial la ovoĵ estas tiel malgrandaj? Diru do al la kamparanino, ke ŝi lasu pli longe sidi la kokinojn super la ovoĵ!''

* *
*



Postmorta promocio.

Sur la tombeĵo de malgranda urbeto troviĝis antaŭ jaroj tomba ŝtono kun jena surskribaĵo: „Tie ĉi ripozas la altestimata sinjorino N. N., edzino de juĝista adjunkto.“ Pasis jaroj; la senkonsola vidvo dume promociis al distrikta juĝisto. La fidela edzo, dezirante partoprenigi je tiu promocio ankaŭ sian delonge mortintan edzinon, ĉizigis sub la vortoj „edzino de juĝista adjunkto“ la vortojn „nune edzino de distrikta juĝisto.“

* *
*

Granda kruco.

„Kara frato, vi ja nun havas multon da ordenoj, nun vi penu ricevi ankaŭ ordenon de granda kruco!''
„Ne estas necese, — mi do havas mian bopatrinon!''

